

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



Sonorilo

56-a jaro - n° 1
Januaro - Februaro 1964



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŝanĝoj en la plej alta
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen
Sidejo : ROESELARE
Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI
AĈETAS ĈE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559
detala • 33408

STROVI estas unuaranga!

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARAAREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES


KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL

ISERENTANT ROGER

DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DR. DENOËL POL, 10 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTINO ŝAKESTRINO POR KONGRESOJ

PLYSON J. 23, PLACÉ E. FLAGEY, BRUSELO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO ŝAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRACHTEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 107S HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODDE, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

POŝTKONTO DE B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT


ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25



48- Universala Kongreso de Esperanto

Okaze de la U.K. en Sofio, Bulgarujo eldonis novan poŝtmarkon kun valoro de 13 stotinkoj, la verda stelo sur la terglobo kaj la sekvanta teksto: 48-a Universala kongreso de Esperanto NR Bulgaria Sofio 3-10-VIII — 1963.



BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

46-a KONGRESO EN LIEĜO (WÉGIMONT)
16-, 17- KAJ 18-A DE MAJO 1964

Adreso por korespondado :
D-ro P. Denoël, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo.

niaj kongresoj

Ekde 1909, — kaj tute regule se ni esceptas la du militajn periodojn, — la belgaj esperantistoj ĉiujare kunvenis en Kongreso, dum la pentekostaj tagoj.

De 1909 tiuj Kongresoj estis organizataj de Belga Ligo Esperantista ; en 1915 kaj 1916, de belgaj rifuĝintoj, kiuj kunvenis en la kadro de la Brita Kongreso ; de 1920 ĝis 1929 denove de B.L.E.

Ekde 1929 okazis samtempe du kongresoj, unu organizita, kiel antaŭe, de B.L.E., kaj alia, kiu grupigis la membrojn de Flandra Ligo.

En la jaro 1951 Flandra Ligo decidis okazigi sian ĉiujaran kongreson, kune kun la nederlanda Ligo, ĝis kiam ; en 1953, — R.B.L.E., F.L.E. kaj L.E.E.N. decidis kunigi siajn fortojn por la organizo de Beneluxa Kongreso.

La unua kaj la lasta, — la 9a —, okazis ambaŭ en Antverpeno, kie ni efektive refoje kunvenis, antaŭ kelkaj monatoj, por Jubilea Kongreso, kiu tamen estis nur la 9a, anstataŭ la 11a ĉar — en 1958 kaj en 1960 —, ne okazis Beneluxa kongreso, unuafoje pro la Ekspozicio en Bruselo, la duan fojon pro la 4a Universale Kongreso.

Pri kelkaj kongresoj ni aldonas noteton :

La 17a Belga okazis en la kadro de la XXa Universale Kongreso en Antverpeno ; la 23a, planita en Spa, estis anstataŭata de Jarkunsido en Antverpeno, pro la subita morto de la Ligprezidanto S-ro Fr. Schoofs.

Pri la du Kongresoj antaŭviditaj kaj preparitaj en 1940, ili kompreneble ne okazis pro la fakto ke la antaŭan tagon, eksplodis la dua mondmilito.

La ĉefurbestro de Kolonjo faris esperantlingvan parolodan

Kolonjo. Okaze de la akcepto de eksterlandaj ekspoziciantoj ĉe al internacia ANUGA-foiro fare de la urbo Kolonjo la ĉefurbestro de Kolonjo, s-ro Burauen, alparolis la gastojn per jenaj vortoj en Esperanto :

« La ANUGA estas la prototipo de internacia ekspozicio. Pro tio, dum akcepto de eksterlandanoj, mi ĉiam sentas min en embaraso, en kiu lingvo mi direktu miajn salutvortojn al vi, sen bezono de interpretisto kaj sen la neceso, neglekti iun landon kaj ties lingvon. Tial mi uzas la popol-ligantan Esperanton, por alvoki al vi ĉiuj, speciale al la gastoj el la elsterlando, « Koran Bonvenon ! ».

Cefurbestro Burauen ne estas esperantisto, li petis la tradukon de sia parolado de s-ro Berger, la iama redaktoro de Germana Esperanto-Revuo.



Agrablan novan jaron

Kaj pri la 30a Belga oni povas diri ke ĝi, lastmomente, estis prokrastata pro la nesufiĉa restarigo de R.B.L.E.

Jen do la kompleta listo de la kongresoj, kiuj kunigis la belga samideanaron (Kie estas menciitaj du urbonomoj, temas laŭvice pri la belga kaj la flandra kongreso).

la 1a : 1909 : Verviers		la 10a : 1921 : Lieĝo
la 2a : 1910 : Bruĝo		la 11a : 1922 : Sta Nikolao
la 3a : 1911 : Charleroi		la 12a : 1923 : Namuro
la 4a : 1912 : Gento		la 13a : 1924 : Bruĝo
la 5a : 1913 : Spa		la 14a : 1925 : Verviers
la 6a : 1914 : Mehleno		la 15a : 1926 : De Panne
la 7a : 1915 : Bath		la 16a : 1927 : Mons
la 8a : 1916 : York		la 17a : 1928 : Antverpeno
la 9a : 1920 : St. Gilles		la 18a : 1929 : Gento
la 19a : 1930 : Lieĝo	— Antverpeno	(1-a)
la 20a : 1931 : Nieuwpoort	— Aalst	(2-a)
la 21a : 1932 : Antverpeno	— Kortrijk	(3-a)
la 22a : 1933 : Bruselo	— Mehleno	(4-a)
la 23a : 1934 : Antverpeno	— Ostendo	(5-a)
la 24a : 1935 : Bruĝo	— Bruselo	(6-a)
la 25a : 1936 : La Louvière	— Gento	(7-a)
la 26a : 1937 : Antverpeno	— Loveno	(8-a)
la 27a : 1938 : Charleroi	— Bruĝo	(9-a)
la 28a : 1939 : Loveno	— Antverpeno	(10-a)
la 29a : 1940 : Bruselo	—	
la 30a : 1946 : Bruselo	— Bruĝo	(11-a)
la 31a : 1947 : Antverpeno	— Mehleno	(12-a)
la 32a : 1948 : Charleroi	— Blankenberge	(13-a)
la 33a : 1949 : Bruĝo	— Gento	(14-a)
la 34a : 1950 : Spa	— Ostendo	(15-a)
la 35a : 1951 : Bruselo	— Hilversum	(16-a)
	1-a komuna kongreso F.L.L.E. - L.E.E.N.	
la 36a : 1952 : Bruĝo	— Rotterdam	(17-a)
	2-a komuna kongreso F.L.L.E. - L.E.E.N.	
la 37a : 1953 : Antverpeno	— 1-a Beneluksa	(18-a)
la 38a : 1954 : Lieĝo	— 2-a Beneluksa	(19-a)
la 39a : 1955 : Utrecht	— 3-a Beneluksa	(20-a)
la 40a : 1956 : Gento	— 4-a Beneluksa	(21-a)
la 41a : 1957 : Eindhoven	— 5-a Beneluksa	(22-a)
	1958 : Ekspozicio Universala	
la 42a : 1959 : Haarlem	— 6-a Beneluksa	(23-a)
	1960 : Universala Kongreso en Bruselo	
la 43a : 1961 : Namuro	— 7-a Beneluksa	(24-a)
	Starigo de la Belga Federacio	
la 44a : 1962 : Hago	— 8-a Beneluksa	
la 45a : 1963 : Antverpeno	— 9-a Beneluksa	
la 46a : 1964 : Lieĝo (Wégimont)		

La unua memstara kongreso de B.E.F.

KRONIKO PRI LA HISTORIO ANEKDOTA!

Kiam Napoleono revenis el Elba al Francujo por reakiri la povon, reĝaj trupoj estis sendataj por aresti lin. Sed ili pasis en lian kampon! La oficiala registara gazeto « La Monitoro » ĉiutage informis siajn legantojn pri la eventoj. En la komenco, ne kredante ke Napoleono sukcesos en la entreprenno, la redakcio ne timis presi la plej akrajn vortojn al la adreso de la imperiestro. Sed... la situacio malboniĝis por la registaro; kaj ili devis iĝi pli prudentaj en la elekto de siaj vortoj. Jen la sekvo. Ni publikigas tie-ĉi la titolon de la artikoloj kiuj rakontis la okazintaĵojn.

La unua tago: « La kanibalo forlasis sian loĝejaĉon »

La dua tago: « La grumblegulo elŝipiĝis en la golfo de Juan »

La tria tago: « La tigro alvenis en Gap »

La kvara tago: « La monstro dormis en Grenoble »

La kvina tago: « La tirano trairis Lyon »

La sesa tago: « La konkeranto estas je distaco de 41 mejloj de la ĉefurbo »

La sepa tago: « Bonaparte alproksimiĝas rapide, sed neniam li eniros Parizon »

La oka tago: « Napoleono estos morgaŭ apud niaj muroj »

La naŭa tago: « La imperiestro alvenis en Fontainebleau »

Kaj la deka tago, tuta kaj kompleta ŝanĝiĝo de tono kaj de sinteno: « Lia Imperiestra Moŝto faris hieraŭ sian solenan eniron en la kastelo de la Tuileries, meze de la fidelaj subuloj »!!!

Ekzemplo de diplomatio.

Reĝo Jakobo la unua, en la komenco de la 17a jarcento, estis la filo de la mortigita Mary Stuart. La mortigon ordonis Elizabeto, la antaŭulino de Jakobo en Anglujo. Kiel pia filo, Jakobo farigis de artistoj lukscenotafon por sia patrino. Sed, kiel reĝo li devis ankaŭ respek-

G. FAES

Eiermarkt, 21
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

ti la konvinkojn de aliaj, eĉ flati ilin. Do, por (devige) honorigi la memoron pri la murdintino de sia patrino, li farigis ankaŭ lukscenotafon por ŝi... je la alia flanko de la ĥoro de la Westminster Abbey!!



La Franca reĝo Filipo la dua (ĉirkaŭ 1200) kiu kromnomis sin ankaŭ « Aŭgusto » pro admiro al la unua Roma imperiestro, estas la unua Franca reĝo kiu sukcesis reakiri perditan aŭtoritaton... ankaŭ sur religiuloj. Li submetis komplete la religiularon al sia propra despotismo. Ekzemple, li mem volis aljuĝi la dignecon de episkopo al tiuj religiuloj kiuj plaĉis al li. Foje du novaj episkopoj devis esti nomataj. Li kunvenigis la kandidatojn kaj la aliajn episkopojn en la ĵus konstruita Notre Dame en Parizo. Inter la episkopoj estis kelkaj vere dikaj tipoj, dum ke inter la kandidatoj estis kelkaj tre maldikaj tipoj. La elekto de la reĝo ne daŭris longe. Tuj li elektis la du plej maldikajn pastrojn, kaj, montrante al la dikaj episkopoj li diris: « jen vi baldaŭ estos tiel dikaj kiel tiuj tie! »

LES ENTREPRISES

DERKS


226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel.: 16.89.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ



— Eldonejo Sonorilo? Se vi ankoraŭ sendas daŭre fakturojn k.t.p., mi aĉetos aliloke!



— Ĉu vi ankaŭ vojaĝas al la Universala Kongreso de Esperanto, Fraŭlino?
— Jes, Samideano!
— Tute sola, por via amuzo?
— Jes, por la mia, NE por la VIA. Samideano!

Kio estas K.P.V.

En ĉi tiu por Esperanto tiom favora tempo, ni ĉiuj rekonas la grandajn meritojn de nia Avangardo; de niaj Pioniroj, pro kies fido kaj sindonemo nia movado sukcesis travivi sian malfacilan kaj minacplenan infanecon.

Ĉar pluraj dekoj el la Plej Unuaj estas ankoraŭ vivantaj, — kaj pro la fakto ke jam en la plej malgranda vilaĝo taŭga magnetofono estas disponebla, — ni kaptas la okazon atentigi Vin pri la ekzistado kaj celo de la **Konservejo de Pioniraj Voĉoj**.

K.P.V. stariĝis en Londono sub la aŭspicio de la Londona Esperanto-Klubo, honore al niaj meritplenaj Pioniroj.

Ĝia celo estas konservi por la posteularo la voĉojn, (surbendigitajn), krome fotojn, — prefere diapozitivojn — kaj biografiajn notojn,

unue: de tiuj el inter ni, kiuj fariĝis Esperantisto jam en la antaŭa jarcento;

due: de tiuj eminentaj Esperantistoj pli junaj, tamen Pioniroj en specialaj medioj aŭ fakoj;

kaj plue: kolekti ekzistantajn registrojn de voĉoj de Pioniroj jam mortintaj.

Por realigi ĉi tiun gravan celon ni urĝe bezonas la helpon de multaj sindonaj, kompetentaj kunlaborantoj en diversaj landoj.

Ĉar rapida helpo estas duobla helpo, ni ĝentile invitas Vin senprokraste sendi al ni proponojn de praktika kunlaboro.

La nomo de ĉiu, kiu helpis efektivigi nian ideon trovos lokon en « Honora Nomaro de Kunlaborantoj de K.P.V. »

Krome ni sendos « Dank-Ateston », kiu montras en kiu formo la tenanto estas ligita al nia K.P.V.

(Permesu la rimarkon ke sendi mondonacojn, por kovri la necesajn kostojn, estas unu formo de kunlaboro.)

Por niaj teknikaj kunlaborantoj jen kelkaj notoj:

Registroj estu farataj per dutrakaj maŝinoj.

Rapideco: 19 cm/sek. prefere, aŭ 9.5 cm/sek.

Direkto: de maldekstre dekstren.

Daŭro: maks. 30 min.; eĉ kelkminuta parolo bonvena.

Bendo: devus esti nova, elstare bonkvalita.

Enkonduko nur kelkminuta, de registranto, dezirata.

Pro evidentaj kialoj ni ne povas konsideri fari kopiojn, krom por vere gravaj institucioj.

Peter Schilperoord,
10, Langbourne Avenue
Highgate - LONDON N.6

RECENZAJ

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (Sro Iserentant R.)

Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140.

Marjorie Boulton : « Zamenhof, aŭtoro de Esperanto ». Eldonis « Stafeto » en la serio de « Movado » sub nr. 3 en 1963. 294 paĝoj. Prezo : 3 us.dol. por la broŝurita kaj 3.80 us.dol. por la tolbindita ekz.

Prof. Dr. Edmond Privat skribis biografion kiu estis unuafoje eldonita de F. Hirt en Leipzig kaj duafoje de la Esperanto Publishing Cy en London. Pri tiu-ĉi bela libro ni jam iom parolis en antaŭa numero de « Sonorilo » kaj publikigis du eltranĉaĵojn. Ĝi iĝis nepre necesajo pro la fakto ke intertempe multaj dokumentoj estis malkovrataj kiuj estis nekoniataj de Privat. Ni atentigas ankaŭ pri la bela, moderna aspekto de tiu-ĉi eldono kaj pleje pri la tre riĉa ilustra materialo. Troviĝas i.a. foto pri la fama evento dum la universala kongreso en Antwerpen en 1911 kiam studentoj fortiris mem la ĉaron sur kiu troviĝis Zamenhof ! Per tio ni sammomente aludis ke en la libro oni povas legi la historion de la komenca periodo de esperanto. Kun granda klarvido M. Boulton skizas personojn kiel de Beaufront kaj la komplikajn konfliktojn. Je la fino de la verko la aŭtorino donas maldetalan superrigardon de la historio de esperanto ĝis post la dua mondmilito. Precipe interesa estas tio kio okazis al la Zamenhofa familio. En la titolo troviĝas : Zamenhof, aŭtoro de E. Cu M.B. ne opinias ke devas esti : iniciatinto ? Laŭ mi, ŝi pravas. Kiam oni aludas politikajn kaj religiajn konvinkojn oni ne povas esti tro singardema. Ekz. Sur p. 135 mi legas : Li povis kompreni nek la bigotan Katolikon nek la nelogikan dogmeman ateiston. Mi estus skribinta : ... nek tiujn Katolikojn kiuj estas bigotaj, nek... » En la libro ni trovas ankaŭ vastajn pecojn de la kongresaj paroladoj de Z. kiuj montras ke tiu timema persono estis bonega paroladanto. Ni ankoraŭfoje varme rekomendas la libron kiun fakte ĉiu samideano devus posedi.

Drs. F. ROOSE

Scienca Revuo, Vol. 13, 128 pp.

« Materialoj pri la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco ».

Post longega interrompo denove aperis volumo de Scienca Revuo, kaj tiu volumo, ampleksante la kvar normalajn numerojn de unu jarldono, enhavas tre atentindan raporton. La raporto ankaŭ estos aparte eldonata sub la sama titolo, kaj estos aĉetebla je la prezo de 30 steloj (105 F).

Laŭ enhavo tiu eldono certe estas interesega por ĉiu kiu dezirus scii ion pri la nuna lingva problemo en la scienco. Dum la 47a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago en 1962a okazis speciala konferenco de sciencistoj, dediĉita al tiu problemo. Ĉiuj prelegoj de la Somera Universitato pritraktis aspektojn de la problemo, kaj dum la konferenco mem pluraj sciencistoj prezentis koncizajn raportojn kaj invitis al diskutado. La diskutoj kondukis al pluraj gravaj decidoj, el kiuj la plej progresiga estas tiu de starigo de universitata centro (pp. 11-13).

Estas menciinde ke el Belgujo estis unu partoprenanto (la subskribanto) kaj ke li faris i.a. raporton pri la lingva situacio en Belgujo ĉe la sciencistoj (pp. 53-57).

Kvankam laŭ enhavo tre interesa kaj rekomendinda, la eldono estas seniluziiga laŭ aspekto. Estas vere ĉagrenige ke tiel bone preparita kaj tiel brila konferenco estas raportata per tiel malzorgita kaj tiel forpuŝiga eldono. Svarmas la prezeraroj (eĉ kelkfoje pluraj en unu linio), okulfrapas la diferencaj litertipoj kaj la malkorekta invicigo de literoj kaj de linioj. De pluraj flankoj jam atingis min rimarkoj de personoj, kiuj ĉagrene konstatas ke tiu multvalora propaganda raporto per sia aspekto multe pli estas malpropagando ol propagando por Esperanto. Ni esperu ke eventualaj pliaj eldonoj aŭ tradukoj estos pli bonaspektaj !

W. DE SMET.

Noto de la redakcio: ni publikigas tiun-ĉi recenzon de nia kunlaboranto Wim De Smet, kvankam ni ne ricevis recenzekzempleron. Ni faras tion esceptfoje pro la fakto ke la enhavo estas de ĝenerala esperantista intereso. Tamen estonte ni ne plu povos fari tion.



J. Rostand. « Tio, kion mi kredas » — Esperantigis : P. Berlot ; Eldonis : Unuiĝo Franca por Esperanto. — 39 pp.

Jen traduko de Franca libreto de J. Rostand el la serio « Ce que je crois ». En la libretoj de tiu serio pluraj francaj famuloj, i.a. Fr. Mauriac, esprimas koncize opinion pri tio, kion ili kredas. La intenco estas ke per tia konfrontado la legantoj povu formi ideon pri kredo, kredendaĵoj, nekredo kaj ateismo, kaj ke ili povu tiel sondi la nunajn filozofiajn tendencojn kaj fine formi propran opinion.

Estas bedaŭrinde ke U.F.E. prizorgis la tradukon de nur unu libreto el tiu serio, ĉar tiel la legantoj nepre ekhavas tre unuflankan impreson pri la kredo en la nuna franca generacio. La elekto de ĉi tiu libreto nepre estas inspirita per la fakto ke la aŭtoro, Jean Rostand, filo de la fama franca verkisto Edmond Rostand (aŭtoro de « Cyrano de Bergerac ») kaj famega progresema biologianto, estas favora partiano de Esperanto.

Sed kion pensi pri la enhavo? La franca teksto datas el 1953 kaj J. Rostand substrekas (p. 7) ke tiuj ideoj estas liaj ĝuste je tiu momento sed ke ili daŭre ŝanĝiĝas. Se li skribus en 1963a, li nepre ne tiel akre kontraŭus la Lamarckismon, ĉar intertempe okazis pluraj decidaj pruvoj favoraj al Lamarckaj evoluad-teorioj. Ne nur la Lamarckismon li atakas, sed ankaŭ la ideojn de pluraj aliaj grandaj biologoj. El lia tuta rezonado elmerĝas la ideo: nia kono ankoraŭ estas tre limigita, malgraŭ la multegaj progresoj de la scienco (pp. 17, 19). Li montras sin dura skeptikulo, kiu kun flegmaj rimarkoj forbalaas la nekonvinkantajn ideojn. Pri la religio kaj pri la animo li agas tre materiisme kaj eĉ mokeme. Tial mi ne povus rekomendi la legon de tiu libreto al katolikoj, kiuj ne estas sufiĉe preparitaj por skeptike trapasi la argumentojn.

Ni esperu ke U.F.E. ne restos unuflankema kaj ke ĝi eldonos ankaŭ tradukojn de la aliaj verkaĵoj el tiu serio, kiuj formas la kontraŭpezon.

W. DE SMET.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj – Speguloj –
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20


KORESPOND — KAJ KONTAKTANONCOJ

- 1) P. Kračeva Str. Rubenova 60 JAMBOL Bulgarujo 18-jara fraŭlino ŝatus korespondi kun samaĝulino; esperas ke ŝi povos viziti la kongreson en Hago.
- 2) Jordan G. Tošev Ul. Reka Leva 20 VRACA Bulgarujo sama aĝo kaj sama deziro.
- 3) F-ino Mila Iv. Georgieva Str. Kiril kaj Metodi 24 GARA LEVSKI Bulgarujo 26jara; deziras korespondi kun belga fraŭlo.
- 4) S-ro Marin Kalomenski Str. Janaki Donĉev 13 TIRNOVO Bulgarujo, inĝeniero; volas korespondi.
- 5) S-ro Asen Grigorev Bulv. Tolbuhin 10 SOFIA Bulgarujo deziras interŝanĝi bulgarajn esperantajn librojn por belgaj aŭ alinaciaj libroj.

Tekstoj por la Marta numero: bonvolu havigi ilin
komence de Februaro.

Krucvortenigmo N° 7

DIFINOJ:



Horizontale:

- 1) Titol' de Zamenhofa verko.
- 2) Amfibia best' - festa lumi-gad'.
- 3) Norvega verkisto - du unu-aj literoj de « povas esti ».
- 4) Lavrimed' - por enirigi.
- 5) Grup' da familioj - verba finaĵo.
- 6) Kiu rilatas al somera frukto.
- 7) Nomo de litero - poem'.
- 8) Laŭ malnova mezurunuo - tri literoj de operacio.
- 9) prefikso - iu objekto - fari el nenio.
- 10) preskaŭ kiel Matuzalemo.

Vertikale:

- 1) Ĉiuj kredantoj je Jesuo.
- 2) Mangebla vegetaĵo - prefikso.
- 3) enlas' de aĉro.
- 4) Laŭ maniero de sankta libro.
- 5) Malgranda papili' - pafileg'.
- 6) Konjunkcio - grasaĵ'.
- 7) Pistita - konjunkcio sen A.
- 8) Kiu rilatas al oficiala reprezentanto.
- 9) Du unuaj literoj de montraĵ vortoj - prepozicio.
- 10) Kiu rilatas al pluraj landoj.

- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos allotata.
3) Sendu NEPRE vian solvon al: Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 6

M A T E M A T I K A
E L E G I O - N U R
L U N - N R - O N I
A M I K E T O - I T
N I L - R O Z - K M
K N A B A - O B L Ě
O I - A L I N E E T
L A - R O B O T - I
I - D A - E - E K
A S E K U R I S T O

Inter la diversaj ensendaĵoj, naŭ seneraraj de S-ino. J. De Hondt kaj S-ro. J. R. Van Eynde, Antverpeno. S-ro. Eneman, Assebroek; S-ro. Iserentant kaj F-ino M. Willems, el Bruĝo. S-ino. E. Ernst el Bruselo; S-ro. M. Lemme el Lieĝo. S-ro. Roger De Smedt el Dendermonde. Lotumado aljuĝis la libropremion al F-ino. Willems.

GRUPA VIVADO

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista Reĝa Societo (Postĉekkonto N° 4835.33)

Ĉiumarde je la 20a okazis la leciono de la elementa kurso kaj je la 21a la kunveno, kun: la 22an de oktobro: interparoligaj ekzercoj. La 5an de novembro ne estis donata leciono, ĉar la tuta vespero estis plenigita per la interesege parolado de Sro. Gr. Maertens pri « Karavano al Sofio kaj la 48a U.K. » kun multaj belegaj kolordiapozitivaj. La 12an estis disaŭdigataj Esp. diskaj kun komentario kaj posta kuna kantado. La 19an la ĉeestantoj debatis pri organizo de kurso per korespondado en semajna gazeto. Konkursludado pri aktualaĵoj (morto de Prez. Kennedy) estis gvidata la 26an de F-ino. Y. Poupeye. Jaŭdon 28an niaj grupanoj vizitis la samurban grupon « Paco kaj Justeco », kie Sro. Roger Martens bonege gvidis « Gramatikon kun rideto ». La 3an de decembro oni festis Sanktan Nikolaon; la alportitaj nekonataj premioj estis dislotataj kaj elvolvataj kun granda plezuro. Parolata gazeto aperis la 10an de decembro kun kontribuoj de F-ino. M. Willems: « Por savi sian hundon » kaj de Sro. Ch. Poupeye: « Nia ŝuldo al Zamenhof », tio okaze de la baldaŭa Zamenhof-kaj librotago.

Programo por Estontaj Kunvenoj

Kunveno ĉiumarde, je la 20a, en « Strijdershuis » Hallestraat, n° 14, tel. N° 347.98. Dum la unua horo: leciono de la elementa kurso, ankaŭ rekomendata al pli malnovaj gemembroj; dum la dua horo:

JANUARO: 7an: Festo de la tri Reĝoj. — 14an: Esp. Junulara Seminario en München, F-ino. Y. Poupeye. — 21an: Parolata gazeto. — 28an: Generala Jarkunsido: raportoj, elekto de la komitato, ktp.

FEBRUARO: 4an: Kanta vespero. — 11an: Karnavalaj amuzajoj. — 18an: Niaj familiaj nomoj. S-ro. Ch. Poupeye. — 26an: Lingvaj ludoj. Sro. Eneman.

† NEKROLOGO

Mortis la tre simpatia kaj tre laborema Antverpena Samideanino S-ino. Maria Volders-Vander Most. En venonta numero ni publikigos « In Memoriam ». Niajn tre sentitajn kondolencojn unue al S-ro. Fernand Volders kaj ankaŭ al la familio.

GEEDZIGO

La 21-12-'63 edziĝis S-ro Bruno Denoël, filo de Dro Denoël el Lieĝo, al F-ino Jeannine Levert. Niajn korajn gratulojn! Ili havu longan feliĉan vivon kune!

KOTIZOJ POR LA 49-A KONGRESO DE ESPERANTO DEN HAAG - 1-8 AUG. 1964

	Gls	Gls	Post
Kongreskotizoj	31-12-63	31-3-64	31-3-64
Kongresano	630 F	700 F	770 F
Edz(in)o de kongresano	315 F	350 F	385 F
Junul(in)o ne pli ol 20 j.	238 F	266 F	294 F
Universitata student(in)o de 20 ĝis 30 jara	392 F	434 F	476 F
Blindul(in)o	315 F	350 F	385 F
Individuaj membroj de UEA (ricevas minimume la jarlibron)			
Kongresano	560 F	630 F	700 F
Edz(in)o	280 F	315 F	350 F
Pagebla al P.K. 2368.04 de S-ino J. Plyson Pl. Eug. Flagey, 23 - Bruselo 5			

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenlerstr. 2 Abdiĵstr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marche-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2